



ESPERO KATOLIKA

LASTA ALVOKO.

Alproksimiĝas „Nia XXV-a” rapidpaŝe. Grandparte jam konkretiĝis la prepara laboro de la loka kongreskomitato.

Sub la prezidanteco de Lia Episkopa Moŝto de Haarlem, Mons. J.P. Huibers, fondiĝis impona honora komitato, kiu sendube kontribuos al sukcesigo de nia manifestacio.

Estas preskaŭ tutcerte ke la urba estraro de Amsterdam oficiale akceptos la kongreson.

La ĝenerala kongrestemo estos: „Esperanto en la internaciaj movadoj katolikaj”. Rev. sac. H.G. Wannemakers S.J. (Nederlando) promesis pritrakti ĝian religian flankon kaj s-ro Fernando de la Puente Solsona (Hispanujo) lumigos la socian, kulturan kaj politikan aspektojn. Post detala diskutado en sekcikunvenoj, la kongresanaro akceptos la tezojn (kun ebleco de ŝanĝoj).

La amsterdamaj esperantistoj daŭre sin okupas pri la prezentotaj fragmentoj el „Gysbrecht van Aemstel”, la fama verko de l'nacia poeto Joost van den Vondel. Ilia seriozeĉo ĉi-rilate estas laŭdinda kaj garantias altnivelan artan vesperon.


En- kaj apudurbaj ekskursoj allogaj konigos al la vizitontoj la ĉarmon de Nederlando, kies koro batas en la kongresurbo Amsterdam.

Preso kaj radio jam promesis sian gravan subtenon.

Se vi ankoraŭ ne decidis aliĝi al „Nia XXV-a”, agu tuj!

Sekretario-kasisto de la L.K.K. estas: s-ro G. Ellerman, de Clercqstraat 42/III, Amsterdam-W. (Poŝtkonto 462266). Post la 19-a ni ne plu povos garantii al vi ke via nomo aperos en la eldonota kongreslibreto.

A. F. Leideritz.



★

HONORA KOMITATO.

Prezidanto: Mons. J. P. Huibers. Episkopo de Haarlem.

Membroj:

Jur. d-ro Arn. J. d'Ailly, urbestro de Amsterdam.

Jac. Alders, sekretario de la Nederlanda Sindikato de Katolikaj Laboristoj, Utrecht.

Mons-ro G. J. v. d. Burg, dekanano de Amsterdam.

Jur. d-ro J.M.L.Th. Cals, ministro de Instruado, Artoj kaj Sciencoj, 's-Gravenhage.
Mons-ro Hub. J.A.M. Eras, religia konsilanto de la Esperantista Ligo
„Nederlanda Katoliko”, Vught.
Prof. d-ro Jos.J.Gielen, eksministro, profesoro en la Katolika Universitato, Nijmegen.
P. Heilker, eksmembro de la Nordholanda parlamento, eksprezidanto de I.K.U.E.,
Soestdijk.
F-ino d-ro M.A.M. Klompé, parlamentanino, membrino de la Nederlanda Delegacio
en la „Eŭropa Konsilantaro”, 's-Gravenhage.
Prof. d-ro J.B. Kors O.P., prezidanto de la Katolika Radio Asocio, Hilversum.
Mons-ro jur. d-ro F.J.C.M. Op de Coul, direktoro de la Katolika Centra Oficejo
por Edukado kaj Instruado, 's-Gravenhage.
Jur. d-ro K. van Rijckevorsel, parlamentano, 's-Gravenhage.
W. Steinmetz, skabeno de Amsterdam.
Jur. d-ro F. H. C. van Wijck, skabeno de Amsterdam.

*

Eparkio
de
Haarlem

Haarlem, la 21an de Majo 1954

Al s-ro L.G.C. de Jong,
VLEUTEN.

Sinjora Moŝto,

En ĝentila respondo al via letero de la 10a de Majo pas., Ni komunikas al Vi ke Ni aprobas ke la 25a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj okazos en Nia Eparkio en Amsterdam de la 31a de Julio - 5a de Aŭgusto 1954.

Ni esprimas Nian konsenton pri la traktotaj temoj, nome:

1 Kiel ni, Katolikoj, povas en kunlaboro limigi la lingvajn malfacilaĵojn kaŭze de internaciaj kontaktoj kaj movadoj?

2 La universala karaktero de la Maria-honorado.

Ni akceptas vian inviton prezidi la Honoran Komitaton.

Tutkore Ni esperas ke via kongreso sukcesos kaj restas volonte, kun sincera respekto, via servanto en Kristo,

✠ J. P. HUIBERS,
Episkopo de Haarlem.

*

SAMIDEANA INTERHELPO.

Nia nova afero komencas trovi sian vojon. Ĝis nun konigis sin 12 aŭ 13 samideanoj. La plej multaj estas rifuĝintoj aŭ hejmforpelitoj. Aliaj estas helpemaj samideanoj, kiuj akceptis esperantigi la leterojn de helpinduloj. Fine kelkaj amikoj komencis korespondi kun ili. Sed ni bezonas novajn helpemulojn.

Niaj kondiĉoj estas: malmulte da mono, iom da tempo, multe da amo: ĉar temas antaŭ ĉio spertigi niajn korespondantojn, ke, se la tuta mondo ŝajnas forgesi ilin, ili tamen restas homoj, kaj ke iu sur la tero interesigas pri ilia persono, pri ilia vivo, kiel Nia Patro en la ĉielo.

Pripensu, ke en la barakaroj de malnovaj militkaptitejoj vivas 250.000 rifuĝintoj el ĉiuj orienteŭropaj landoj, kaj ankoraŭ plimulte da germanaj forpelitoj. Pensu pri viaj gefratoj! Skribu al „Ostpriesterhilfe, Esperanta sekcio, Saint-Vith, Belgujo. Vi laŭdezire ricevos francan, nederlandan, germanan, anglan, hispanan aŭ italan dokumentadon. Sendu al ni Esperantan legaĵon!

Abbé Louis Muller, Collège de l'Immaculée Conception. St-Vith, Belgujo.

LA DI-PATRINO PLORIS EN SIRACUSA.

Siracusa, grekdevena urbo, kuŝas sur insuleto, ligita al la kontinento per granda ponto. En la insuleto estas silentego, vidindaj antikvaj monumentoj, etaj mezepokaj stratetoj, imponaj preĝejoj.

En iu mizera domo, super la lito de juna laborista paro pendis sur la muro gipsa bildo de la Di-Patrino, ne arta bildo, sed malmultekosta donaco de iu parenco okaze de la geedziĝo.

La edzino, graveda, estis malsana kaj kuŝis senĉese en la lito, dum la edzo blasfemis kaj plendis pro sia malfeliĉo. En la fino de Aŭgusto 1953, strangaj larmoj falis el la okuloj de la bildo: la malsanulino tuj resaniĝis de siaj doloroj. Oni klopodis sekigi la larmojn per kotonno, sed ĉiam ree la okuloj repleniĝis de larmoj, kiuj falis sur la kolo, sur la vesto de la bildo, kaj poste malsekigis la litaĵojn.

Ĥemiaj doktoroj analizis la larmojn kaj konstatis ke estas veraj homaj larmoj. Nia Eklezio silentis.

Komenciĝis grandaj pilgrimoj al la sankta bildo. Oni devis meti ĝin sur ŝtonan kolonon en la apuda granda placo, kiu tage kaj nokte estis plenplena da homoj. Ateistoj kriis pri hipokrito, friponaĵo, trompo! La sicilia popolo, kiu spite ĉio, estis ĉiam religia, reagis. La pilgrimoj iĝis pli multnombraj, pli oftaj. Alvenis specialaj vagonaroj, centoj da aŭtobusoj, miloj da privataj aŭtomobiloj; la homoj venis ĉiumaniere, piede, per fiakroj, per ĉaroj, per motorcikloj!

Ankaŭ mi iris tien kaj estis surprizita pri la eksplodo de sincera kortuŝanta pieco en niaj tempoj: miloj da homoj surgenuie; malsanuloj sur portiloj; ĉiuj laŭvoĉe preĝantaj, multaj plorantaj.

Okazis kelkaj ne-ordinaraj resaniĝoj. Oni kriis: miraklo!

Nia Eklezio silentis!

Ekestis speciala komisiono de sacerdotoj kaj kuracistoj kiuj atente ekzamenis la tiel diritajn „miraklojn” kaj pri kelkaj ili deklaris ke „la ekzamenitaj resaniĝoj estas neordinaraj, neklarigeblaj per niaj scienckonadoj”. El tiuj faktoj mi konas unu: mi konas persone en mia urbo fraŭlineton 17-18 jaran; ŝi estis denaska lamulino ĉar la ostoj de unu kruro estis pli longaj ol tiuj de la alia. Ŝi iris al la Di-Patrino kaj tuj resaniĝis. Mi nun vidas ŝin marŝi tre bone!

Pro tiuj faktoj la sicilia Episkoparo kunvenis en Palermo ĉe la tiea Kardinalo, Lia Eminenca Moŝto Ruffini, kaj proponis al la Eklezio „rekoni” la miraklojn. La Ĉefepiskopo de Siracusa raportis al la Sankta Patro Pio XII la decidon de la sicilia Episkoparo. De tiam oni permesis publikajn preĝojn, oficialajn pilgrimojn.

La 8an de Majo L.E.M. Kardinalo kun la tuta sicilia Episkoparo venis en Siracusa kaj enfosis la unuan ŝtonon por konstrui grandan preĝejon honore de la Di-Patrino de la Larmoj.

Pri la mirakloj nia Eklezio ankoraŭ silentas kaj, laŭ la Dekreto de Papo Urbanus IV, ne rekonas ilin: tamen oni atente pristudas ĉion. Dume daŭradas la neordi-



*La Madoneto de la Larmoj
Foto Majorca - Siracusa*

naraj resaniĝoj kaj ankaŭ la resaniĝoj de animoj kaj koroj venenitaj de malamo al Dio!

Ploris la Di-Patrino, ploris pro la pekoj de la homoj, ploris por mildigi la koron de Jesuo je la kompatinda homaro: ke la Di-Patrino savu nin!

Siracusa, la 8an de Majo 1954. I.E.F. — Sicilia Delegacio.

*

BABELA TURO KAJ ESPERANTO.

La Biblian rakonton pri Babela Turo ni ofte trovas survoje de niaj propagandaj klopodoj por Esperanto, kiel argumenton kontraŭ la celo mem de nia Idealo: Provizi ĉiujn homojn je komuna lingvo, por ke ili povu kompreni sin reciproke. Sed, laŭ multaj personoj, tie kuŝas la diskutebla punkto: depost la Dia malbeno, la homoj ne rajtas uzi komunan komprenilon ĉar Dio pune konfuzigis la unikan lingvon, kiun ili parolis en la prabiblia tempo. Konklude, la celo de Esperanto staras kontraŭ la Dia decido!

Tre facile refutebla argumento! ĉar ĝi kuŝas sur malbona interpretado de la sankta teksto. Efektive, ni relegu la Genezon (11, 1-9) penante kompreni la kialon de la Dia puno. Ĉu ĉar tiuj prapopoloj parolas unu lingvon? Ĉu ĉar ili planas la konstruon de alta turo? Tute ne! La Dian punon estigis la malpia intenco, la ofenda plano de tiuj homoj; ili volis altiĝi tiun turon ĝisĉielen tute ne honore al Dio, sed por montri sian gloron al siaj posteuloj, por eternigi sian nomon kaj, — kial ne — por diskuti kun Dio anstataŭ adori Lin kaj obei Liajn sanktajn leĝojn. En tiu malobeo, en tiu malodoro, en tiu fiereco, en tiu ribelo kontraŭ Dio kuŝas la peko kaj de tie devenas la puno.

Kaj por ni, Esperantistoj, estas treege grave kaj kontentige koni la punilon: Dio konfuzigis ilian lingvon kaj sekve, tiuj homgrupoj iris disen; tie, la Biblio alportas al ni plian pruvon, ke la multeco da lingvoj estas la ĉefa barilo al frateca kunvivado de ĉiuj popoloj kaj plenlume aperas nia rolo: strebadi por estigi veran fratan pacon inter ĉiuj homoj per la disvastigado de nia lingvo, Esperanto. Kiam ni atingos nian celon, ne estos por samniveligi nin kun Dio kaj ribeli kontraŭ Liaj dekretoj sanktaj, sed por danki Lin por la Paco kaj tiel, obei plene unu el Liaj plej gravaj leĝoj: Amu vin unuj la aliajn.

Pli simpla refutebleco kuŝas en tio, ke kvar Papoj: Pio Xa, Benedikto XVa, Pio XIa kaj Pio XIIa aprobis Esperanton kaj ĝian idealon. Kompreneble ne estas dogmo kaj neniu povas plenrajte preteksti, pro tio, la neerareblecon de Papa Aŭtoritateco. Tamen, se oni konsideras la gravan dokumentaron, kiun Vatikano posedas pri ĉiuj aferoj kaj pri ĉiuj landoj kaj la egan prudenton kaj singardon laŭ kiuj la Vikarioj de Kristo publikigas tiun aŭ alian aprobon aŭ malaprobon, oni povas konkludi, ke la senĉese favora sinteno de la Papoj al nia afero kaj precipe la kuraĝigaj paroloj de Pio Xa: „Mi agnoskas la utilecon de Esperanto por konservi la unuecon de la katolikoj de la tuta mondo. Esperanto havas grandan estonton antaŭ si”, estas por ni, Katolikoj kaj Esperantistoj programo kaj lumigilo sur la de ni irota vojo.

Sub la gvidado de niaj religiaj Estroj, ni do daŭrigu pene paŝi sur la vojo al Beno kaj al Sukceso, konvinkitaj, ke ni penas por afero sankta kaj dibenita: la plifirmigo de Paco kaj la Frateco de ĉiuj homoj en Kristo,

A. Ribot.

*

3. Kaj nun ni esploru la resaniĝojn nomitaj „Mirakloj” aŭ „Miraklaj Faktoj”, do la resaniĝojn ĝenerale.

KIE la resaniĝoj okazas? Ili okazas ĉu en Lourdes, ĉu aliloke, ekstere de Lourdes. **En Lourdes** resaniĝo povas subite okazi: antaŭ la Groto; en la Banbaseno, post bano parta aŭ kompleta; sur la Parada Placo, la „Esplanado”, posttagmeze dum la Beno de la S. Sakramento; dum la loĝado en la Hospitaloj; aŭ dum la Kalvaria Vojo.

Ekstere de Lourdes iu resaniĝo povas subite okazi: en vagonaro; en hospitalo aŭ kliniko kie la malsanulo estas kuracata; en sanatorio aŭ en religia loko.

KIAM la resaniĝoj okazas? Iam ajn... Nenio permesas antaŭvidi ilin. Sed, ĉiam ili okazas sekve de **preĝoj** aŭ de religiaj agoj. Post preĝoj recititaj de la malsanulo aŭ de aliaj personoj, favore por li; post tagnaŭo (preĝo dum naŭ tagoj) honore de la Sankta Virgulino aŭ de Sankta Bernadette; post sorbo aŭ trinkado de grotakvo, tio memvole, aŭ post kiam oni metis kelkajn gutojn da grotakvo sur la lipojn de la malsanulo en mortŝajna dormo aŭ en komato; aŭ ankoraŭ post surmeto de grotakvo sur la korpon de la malsanulo: dum bano en la banbasenoj; dum la Beno de la S. Sakramento, aŭ eĉ dum ties trairejo tra la Grotbienaro. **KIEL** la resaniĝoj fariĝas? Neniu komprenas tion, la kuracistoj penas eltrovi. Ili konstatas vundojn tre rapide cikatriĝantaj; tumorojn subite malaperantaj; difektajn organojn rekomencantaj siajn funkciadojn; mortantojn reprenantaj vivon kaj resaniĝantaj; kriplulojn, invalidojn, refariĝantaj normalaj estuloj...

KIAL la resaniĝoj fariĝas? Ni, kuracistoj, oficiale ne respondas...

KIOM da resaniĝoj okazis de post la „Aperoj”? Kiom estas konstatitaj de la kuracistoj?

De post 1858 multaj resaniĝoj okazis. Sed proksimume 1200 el ili estas konsiderataj de la kuracistoj kiel vere eksterordinaraj, el vidpunkto pure scienca.

En la realeco multaj aliaj **veraj** resaniĝoj okazis. Oficiale, la Eklezio akceptis kvindekon da ili, ĉar multe da ili ne estis ekzamenitaj de la Eklezio pro diversaj motivoj: dum periodoj de ne-leĝaj kunsidaroj de Laŭkanonaj Komisioj, dum periodoj de milito.

Tiel la sep unuaj resaniĝoj de Lourdes estis anoncitaj „miraklaj” de la unua Laŭkanona Komisio elektita de Lia Episkopa Moŝto LAURENCE, episkopo de Tarbes kaj Lourdes, en 1862. Poste neniu Laŭkanona Komisio estis elektita por zorge esplori la eksterordinarajn resaniĝojn oficiale akceptitaj de la Kuracistoj de la Oficejo.

En 1905 la Papo PIO DEKA instigis la kuracistojn kaj la episkopojn por submeti la resaniĝojn al la juĝo de Laŭkanonaj Komisioj. De 1908 ĝis 1913 tiuj Komisioj proklamis tridek tri resaniĝojn kiel miraklaj. De 1914 ĝis 1946 neniu estis nomita. De post 1946 ĝis hodiaŭ la novaj L.K. proklamis ok aliajn resaniĝojn kiel miraklaj. Sumo de la resaniĝoj proklamitaj „Mirakloj” de la L.K.: 48.

KIUJ personoj resaniĝis? Suĉinfanoj, infanoj, junuloj, junulinoj, viroj, virinoj, maljunuloj, maljunulinoj, de situacioj kaj socialaj rangoj diversaj resaniĝis.

KIAJ malsanoj resaniĝis? Kiaj kripluloj? Kiaj invalidaĵoj?

Denaskaj bulpiedoj, gravaj vundoj, ostarompoj, nekuraceblaj kancertumoroj, uteraj fibromiomoj, tuberkulozoj je diversaj lokalizoj, ĉiam gravaj; daŭraj fistuloj, nekuraceblaj okulolezoj, organismaj lezoj sekve de militvundoj ktp. ĉiam „organikaj lezoj”, resaniĝis.

(Daŭrigota) D-ro Paul Léger.

ESPERANTO VIVAS.

La 32a Internacia Foiro de Padova (Italujo) okazinta de 29 majo - 13 junio ĉ.j. laŭkutime uzis Esperanton kaj eldonis bele ilustritan faldfolion en Esperanto. *

En la belega porjunulina revuo „Sonnenblumen” aperanta en Heidelberg (Germ.) la famkonata „Esperanto-knabino Sinjo” gvidas Esp. kurson kiu vekis grandan intereson inter la legantinoj. *

Ĉiam pli da turistaj oficejoj eldonas faldfoliojn en Esperanto, ofte tre luksajn kaj belege ilustritajn. Sekvas listeto de la en lasta tempo de ni ricevitaĵoj, kiuj estas senpage haveblaj ĉe la eldonistoj. Se tiuj loĝas en via propra lando, vi nepre skribu en nacia lingvo, ĉar tiam la uzo de Esperanto, rekomendinda por eksterlandanoj, nur ridindigus nian aferon!

Hannover — Städt. Verkehrsbüro, Hannover, Germanujo.

Marbordaro de Etna — Ente Provinciale Turismo, Catania, Italujo.

Antverpeno, Urbo de Rubens kaj Plantin — Service de Propagande et de Tourisme, Pelikaanstr. 6, Antwerpen, Belgujo.

Florbulboj, ankaŭ en via ĝardeno! — Bloembollencultuur, Wilhelminastr. 45, Haarlem, Nederlando.

Kurhessen & Waldeck, Juveloj — Fremdenverkehrsverband, Rathaus, Kassel, Germ.

Koran Bonvenon en Stuttgart — Verkehrsbüro der Stadt Stuttgart, Bahnhofplatz 1, Stuttgart, Germanujo.

*

I.K.I. VIII.

Ni, Esperantistoj, vere povas fieri pri la bonfavora al Esperanto sinteno de la Sankta Seĝo, ĉar ne malpli ol 4 Papoj donis al nia movado sian Apostolan Benon. La unua Papo, vi ja ĉiuj scias, estis nia Sankta Pio X, kiu donis sian Benon al Sacerdoto Peltier okaze de ties unua prediko esperantlingva. Sekvis Benedikto XV, Pio XI kaj nia nuntempa Sankta Patro Pio XII. Ĉu ni, katolikaj Esperantistoj, ricevis tiun Benon nure, ĉar ni tiel bone praktikas Esperanton laŭ komerca, turisma, kongresa k.s. vidpunktoj? Aŭ ĉar ni tiel komplezeme interŝanĝas leterojn kun la enloĝantoj de kiuj ajn landoj en la mondo? Aŭ ĉar ni tiel fervorege interŝanĝas p.m. il.p.k. ktp.? Ne ridu! Vere oni preskaŭ inklina opinii, ke tiele statas la afero, ĉar kiel oni, laŭ la rezultato por IKI, povas vidi ĝin alie? Nur kiam la subtenado al IKI pli ampleksos, tiagrade, ke IKI fine elkreskos ĝis memstara, finance sendependa institucio, tiam oni povos revidi tiun opinion. Sed mi timas, ke ankoraŭ longa estos la vojo tien.

Ĉiuj ja ni scias, ke ni katolikoj kaj esperantistoj, ricevis la Papan Benon, ĉar ni, ankaŭ kiel esperantistoj, estas fidelaj anoj de la katolika Eklezio, kiu de sia Fondinto ricevis la mision: „Iru kaj instru ĉiujn popolojn de la Mondo!” Kiu plenumadas el via nomo tiun mision preskaŭ laŭlitere? Tiu estas via propra Mision-Instituto, la IKI en Nederlando. Kie niaj misiistoj kaj niaj sacerdotoj ne povas enveni, tie enpenetras IKI en la menson, en la koron de ĉiu, kiu petas klarigon pri la por li malklara katolika Religio.

Kiuj estas IKI? Tiuj estas vi mem, kiuj ebligas per viaj mondonacoj al IKI praktiki tian veran mondapostoladon. Ne forgesu! Se vi amas vian Kredon, se vi estas konvinkita pri la vero de via Religio, kapabligu aliulojn akiri ĝin.

E.H.

NOMOJ DE SANKTULOJ EN ESPERANTO. V.

8. Constans-Constantius-Constantinus.

Ekzistas malgranda grupo de propraj nomoj latinaj kun la finaĵo -ns en la nominativo kaj -ntis en la genitivo, ekz.: Clemens-Clementis.

Variaj tradukoj jam troviĝas en Esperanto:

Klemenso A. Dombrovski E.K. 2, 1905, 31 - VVV I,38.

Klemens VVV II, 115, 271.

Klemenco Tutmonda Laŭdo 96.

Klemento Ofic. Gazeto, II, 1909-10, 223.

Hans Jakob. Oficiala Jarlibro UEA 1928, 48.

K. Kalocsay, Dante, Infero, 150.

L. Chiba, Katolikaj Kantoj, 1927, 65.

Al la sama grupo apartenas: Constans, Fulgens, Pudens, Valens. Por trovi ĝustan tradukon de tiuj ĉi nomoj en Esperanto ni kune konsideru la parencajn nomojn, kies kompleta serio troviĝas ĉe la unua nomo: Constans-Constantius-Constantinus.

Ni jam tradukis Constantius per Konstanco (EK 51, 1954,6), tiu formo do ne plu estas uzbla por traduko de Constans. Por traduko de Constantinus jam estis proponita: Konstanteno (E.K. 51, 1954, 34).

Pro tio, ke la nominativo de Constans k.s. kaŝas la literon t, kio montriĝas en la genitivo, la elekto do koncernas la formojn Konstanso kaj Konstanto.

El la tradukoj de Clemens, kiuj solaj troviĝas en la esperanta literaturo, ni vidas ambaŭ formojn: Klemenso kaj Klemento.

Dum la latina lingvo donas fundamenton al ambaŭ formoj, la derivaj formoj en la modernaj naciaj lingvoj dividiĝas en du grupoj:

angle, germane, nederlande: Clemens;

france: Clément, hispane, ita'e, portugale: Clemente.

Tiel ni trovas france: Valent kaj Constant, kaj portugale: Valente.

La esperanta formo Klemento plue ebligas la inan formon: Klementino, kiu certe estas preferinda ol Klemensino.

Krome la reguleco inter: Konstanto kaj Konstanteno, Valento kaj Valenteno, instigas la saman preferon.

Se ni rimarkigas, ke la listo en la Oficiala Gazeto jam proponis: Klemento -ino, ni opinias, ke la elekto de la formo je -to por ĉi tiuj nomoj estas sufiĉe fondita.

Tiel estos la du serioj de latinaj kaj esperantaj nomoj:

Clemens	Constans	Fulgens	Pudens	Valens
Klemento	Konstanto	Fulgento	Pudento	Valento

(Daŭrigota) H. G. Wannemakers S.J.

*

ESPERANTO EN LA SERVO DE LA INTERNACIA KORESPONDADO

Por plivastigi la rilatojn inter katolikoj el diversaj naciecoj, anaj aŭ simpatiaj je „Pax Christi”, internacia korespondado estas organizita.

Bedaŭrinde, escepte en la intelektaj medioj, la barilo de la lingvoj konsistigas proksimume netransireblan malhelpon al la plimulto de niaj aliĝintoj. Malmultaj homoj scipovas la alilandajn lingvojn, aŭ havas la eblecon lerni ilin. Tamen por intensigi la klopodon favore al la Paco, estus necese plilarĝigi la bazojn de la movado kaj atingi la plimulton de la kristanoj, donante al ĉiuj tiun eblecon interkorespondadi. Esperanto, facile atingebla de ĉiuj, aperas kiel providenca ilo por atingi tiun celon. La esperantistoj, Packristanaj, petu nun aliandajn korespondantojn.

Oni aldonu al ĉiu franca peto tri intertarifajn poŝtmarkojn, kaj al ĉiu alilanda peto, unu internacian respondkupon.

Skribu tre legeble: nomon, baptnomon, aĝon, adreson, profesion, faritajn studojn, kaj proprajn emojn, ankaŭ la alilandan regionon prefere elektotan. Actualaj eblecoj estas: Germanujo, Nederlando, Hispanujo, Anglujo, Yugo-Slavujo, Japonujo k.t.p. Adreso: S-ro Yves Guillon, 52 rue de Lorient, Rennes (Ille & Vilaine) Francujo.

POR LA FERIOJ.

Eble en viaj ĉi-jaraj ferioj vi vizitos la malgrandan landon ĉe la maro, Nederlando, kie okazos nia 25a IKUE-kongreso. Tiam vi ne forgesu la (nun duon-) insulon forkaptitan de la maro, kiu nomiĝas Walcheren (Valĥeren); ĝi estas parto de la provinco, tiel karakterize nomita Zeeland, t.e. Marlando. Tiu insulo sin erektis fortege el la detruado kiu trafis ĝin per la bombardadoj kaj inundadoj je la fino de la milito kaj poste sekve de la granda inundego de Febr. 1953. Vi povos kvazaŭ en unu rigardo transvidi la tutan insulon kun ĝiaj belaj konstruaĵoj, turoj, domoj historiaj kaj modernaj, se vi vizitos la miniaturan insulon, konstruita en la provinca ĉefurbo Middelburg. La 25an de Junio la reĝino Juliana faris la oficialan malfermon. Je dudekona skalo la konstruaĵo estas laŭnatura reprodukto de Walcheren kun reprezentaj objektoj.

Jen kelkaj nombroj kaj detaloj: Sur ok bienkampoj staras 40.000 arbetoj kaj arbustoj, 50.000 floretoj kaj rokplantetoj. Dunoj kaj digoj protektas la insulon. Vespere miloj da elektraj lampetoj brilas. La akvo fluas en la marbranĉoj apud Veere, Westkapelle kaj Rammekens, en la havenoj de Vlissingen kaj en la fortikaĵoj ĉirkaŭ la antikvaj bastionoj; eĉ la jarcenta „bronz-tavolo” ne estas forgesita. Vlissingen montras i.a. la 75 m. longan modelon de la ŝipego „Kungsholm” en elfosita parto de la haveno; vespero la lumetoj brulas. Middelburg fieriĝas pri siaj antikvaj konstruaĵoj kiel la Urbdomo kaj la Abatejo kun la „alta Johano” t.e. la turo en kiu la sonorilmuzikisto ludas sur la sonorilaro miniatura; la Walcheraj kampdomoj eĉ havas siajn kurtenojn.

Por la konstruado oni uzis i.a. 2500 M2 da malmola kartono; engluitaj estas 50.000 tegoloj, sennombraj brikoj. La laboro kostis en unu kaj duona jaro, 90.000 laborhorojn, kiujn proks. 150 homoj senpage donis. Duonvoje vi povos interrompi vian promenadon de 750 m. en la restoracio, al kiu oni donis la nomon: „Don Suisse” pro danko al Svisujo, kiu tiel ege helpis Walcheren post la milito.

Do mi elkore rekomendas: Venu al Walcheren inter la 25a de Junio kaj la 15a de Septembro; vi kunportos de tie belan rememoron!

C. A. O., sac. Vlissingen.

*

ALVOKO AL HONORA KONKURSO.

Konvena propono pri belarta statuo, kiu dekoru novan „Esperantoplaco” en la sveda havenurbo Gotenburgo, estas serĉata. La placo, la unua en Skandinavio, situas en moderna kaj vige trafikata urboparto.

Per tiu ĉi alvoko ni turnas nin al ĉiu kapabla artdesegnisto kaj skulptisto petante pri helpo. Helpu nin per viaj ideo, sugesto aŭ pozitiva projekto kiel eble plej efektive ornamu tiun placon. La statuo esence simboligu la universalecon de Esperanto, sed ankaŭ estu alloga el estetika vidpunkto.

La tuta materialo estos ekspozicie prezentata kaj de fakuloj jugata. La venkinta projekto por ĉiam honoros la artiston.

Por ke ankaŭ neeŭropanoj povu partopreni ni etendigas la konkurstempon ĝis la fino de decembro 1954.

La materia'o estu sendata al:

Esperanto-Statuo, Box 11035, Göteborg 11, Svedlando.